

4/2018

Julio  
Aŭgusto

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Iom pri socia inerteco
- ★ La 51-a ILEI-kongreso en Madrido
- ★ Pri cikonio - simbolo de la pola naturo

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodz@wp.pl](mailto:rk-lodz@wp.pl)

## **Kunlaboro**

T. Nemere, M. Tatara,  
A. Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2018 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post aldono  
de 5 eŭroj por la bankaj kostoj.  
Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: peaa-v;  
Detaloj troviĝas ĉe:  
[http://www.uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO  
ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

## **Estraro de PEA**

Aleksander Zdechlik - prezidanto  
Teruo Matsumoto - vicprezidanto  
Robert Kamiński - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Agnieszka Mozer - estrarano  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendadas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Reprezo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

Fronta kovrilpaĝo - Katarzyna Lewończuk-Barańczuk el Centro Ludoviko  
Zamenhof en Bjalistoko prezentas libron "Antaŭprintempo" de Stefan Žeromski

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Eventoj</b>	
<i>Liba Gabalda</i> , La 51-a ILEI-kongreso en Madrido .....	3
<i>Peter den Breems</i> , Rememoroj pri la ĉijara Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno .....	7
<i>Teresa Nemere</i> , Vespero kun „Sinjoro Tadeo” en Toruń .....	9
<b>Mojose</b>	
<i>Mariusz Hebdzyński</i> , Esperanto ĉe Slot Art Festival 2018: viva lingvo en revivigita monaĥejo .....	10
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Adam Wilkus</i> , Vagado tra Beskidy-montaro .....	12
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Jean Marc Leclercq</i> , La socia inerteco .....	14
<i>Magdalena Tatara</i> , Forpaso de Irena Szewińska (1946 - 2018) - elstara pola sportistino .....	15
<i>Adam Wilkus</i> , Pri cikonio – simbolo de la pola naturo .....	16
<b>Homoj</b>	
<i>Informservo de komunumo Siedlec</i> , Rememoro pri Antoni Beyga .....	20
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , “La” – bazaj reguloj – parto 3 .....	22
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Lidia Ligęza</i> , El poezio kaj prozo de Bolesław Leśmian .....	24
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Andreo Bach</i> , Ni rigardu supren, ni rigardu la ĉielon .....	26
<b>Leterkesto</b>	
<i>Katalin Kovac</i> , Estimataj polaj membroj de edukado.net .....	28
www.pej.pl, Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo en Katowice .....	29
www.pej.pl, Junulara E-Semajno: festu la jarŝanĝon en Esperantujo .....	29
<b>Kalendaro</b>	30
<b>Oni eldonis</b>	
<i>Małgorzata Komarnicka</i> , El amo al Esperanto – estiĝo kaj eldono de la plej nova Esperanto-lernolibro .....	33
<b>Forpasis</b>	
Antoni Beyga, Roman Siemiątkowski, Zuzanna Jankowska .....	36
Nia fotogalerio	36

Estimataj legantoj!

Pasis somero kaj ni ĉiuj jam revenis de someraj vojaĝoj. Ni povas resumi pasintan someron. Multaj poloj partoprenis en Esperanto-kunvenoj en Hispanio, Portugalio kaj Italio. La unua, granda internacia renkontiĝo - la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto kunligita kun 51-a Kongreso de ILEI okazis en Madrido. Al ambaŭ aranĝoj venis rekorde granda nombro da gastoj. De jaro al jaro kreskas la nombro de ILEI-kongresanoj, kiu estonte povas fariĝi konkurenca al partoprenantaro de Universala Kongreso.

ILEI- kongreso de jaro al jaro kreskas kaj eble estos konkurenca al Universala Kongreso.

En Lisbono oni organizis 103-an UK-on, kiu okazis je la unua fojo en Portugalio. Nombro de partoprenantoj atingis 1700 kaj oni povas trakti tiun UK-on kiel mezgrandan. La nova kongreslando instigis multajn samideanojn veni al Lisbono. La kongresurbo salutis gastojn per altega temperaturo, ne kutima en Portugalio. Multaj kongresanoj, post tuta semajno de tropikaj veterkondiĉoj, volonte revenis al siaj, malpli varmaj, landoj.

Poloj jam tradicie partoprenis en Kongreso de Italaj Esperantistoj, kiu ĉijare okazis "eksterlande" en San Marino.

Pri ILEI-kongreso en Madrido interesan raporton verkis Liba Gabalda el Francio. Tekstoj pri la 103-a Universala Kongreso okazinta en najbara Portugalio aperos en la venonta numero de Pola Esperantisto. Kompreneble, ĉi-somere ankaŭ en Pollando oni povis partopreni diversajn esperantistajn aranĝojn. Mi instigas vin legi raporton pri jubilea esperantista feriado en Mielno kaj pri aliaj kunvenoj en pola esperantujo.

*Robert Kamiński*



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



# Eventoj

*Liba Gabalda*

## La 51-a ILEI-kongreso en Madrido

De la 20-a ĝis la 27-a de julio okazis en la hispana ĉefurbo Madrido la 51-a pedagogia kongreso de ILEI, al kiu aliĝis 256 gesamideanoj el 33 landoj. Samtempe okazis la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto. La aranĝoj okazis en la rezidejoj *Teresa de Jesús* kaj *Diego de Covarrubias*, kie la partoprenantoj loĝis en studentaj ĉambroj. Diversaj salonoj havis nomojn de konataj esperantistoj.

La solena inaŭguro kaj pluraj ILEI programeroj okazis en la fakultato pri humanismaj fakoj en la "Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado", konata sub la nomo UNED. La 26-an de julio tie okazis la Simpozia tago kun interesaj prelegoj, kiujn ĉiuj povis ĉeesti.



Unua promenado tra centro de Madrido

La LKK-anoj strebis organizi agrablajn tagojn por la partoprenantoj. Tre riĉa estis la oferto de turisma programo. Ni povis ekkoni ne nur la

historion de Madrido, ĝiajn muzeojn, sed ankaŭ admiri ĝiajn ĉirkaŭaĵojn kaj belaĵojn dum tagaj aŭ noktaj promenoj.

Post la alveno, sabate, la 21-an de julio, vespere okazis interkona frandvespero, kie ĉiuj alportis ion tipan por trinki aŭ manĝi el sia lando. Poste, la ensemblo "Kaj Tiel Plu" animis la vesperon per siaj okcitanaj, sefardaj, trobaduraj kaj katalunaj kantoj, kelkaj el ili kantataj esperantlingve. Alian vesperon, la duopo Ankie kaj Nanne el Nederlando ĝojigis la kongresanojn per koncerto kun siaj humuraj kaj etosoplenaj kantoj.

La ĉeftemo de la kongreso estis: "La kultura heredaĵo de Esperanto". Ĝi estis pritraktata en la enkonduka prelego de la prezidantino de ILEI Mireille Grosjean. La festprelegon "La eduka modelo de UNED" prezentis Manuel Pancorbo Castro.



Frاندvespero apud kongresejo



Muroj kaj pontoj de Toledo

La programeroj konsistis el prezentado de kelkaj libroj, oni diskutis pri la revuo de ILEI "Juna Amiko". Junuloj havis sian programon; ili amuziĝis ĉefe nokte. Okazis vizito al la Instituto de Kultura Heredaĵo, promeno tra la scenaro de la batalo de Madrido ;*NO PASARÁN!*

Dum la semajno okazis E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj ankaŭ intensa kurso pri la hispana lingvo. Irina Gončarova el Rusio parolis pri siaj spertoj kaj sukcesoj dum la baza E-kurso "Faru la Rondon". Yasuo Tabuchi parolis pri la instruado kadre de Oomoto, Duncan Charters pri *Al Ándalus* – la araba regado dum la mezepoko de la 711-a ĝis la 1492-a jaroj. Eblis babili kun Jorge Camacho pri verkado kaj tradukado en Esperanto. Miguel Gutierrez Adúris prezentis la kvaran eldonon de sia vortaro "Amika".

Dum la Nacia Vespero prezentiĝis muzikistoj de la plektro-orkestro *Calle del Barguillo*, en kiu kantis la hispana poeto Miguel Fernández. Emocia estis prezento de flamenka danco. Ni ĝuis ankaŭ la spektaklon "Vivu la Teatro!" kun Miguel Fernández.



Adjévi Adjé, Magdalena Tatara kaj Liba Gabalda

Dennis Keefe alproksimigis al ni sian revon pri Esperanto-plaĝo. De Lida Elbakjan ni eksciis pri armena kultura heredaĵo. Marija Jerkovič parolis pri Esperantonimoj, Rob Moerbeek pri lingvaj esploraĵoj, Ana Manero prelegis pri avangarda artistino *Maruja Mallo*, Aŭrora Bute pri pioniro de modernismo en la skulptarto *Constantin Brâncuși*. Pri la afrika kulturo kaj ties E-movado ni eksciis de Adjévi Adjé. Maritza kaj ŝia filino Ariadna prezentis la kuban kulturon en la E-movado. Ne mankis libroservo, estis instalita foto-ekspozicio pri kultura kroata heredaĵo kaj alia pri Esperanto. Ĝinda estis aŭkcio, lerte gvidata de José Antonio del Barrio kaj Katalin Kováts.



Vespera koncerto de  
duopo Ankie kaj Nanne  
el Nederlando



Nova estraro de ILEI  
elektita en Madrido

Ĉe la fino, estis prezentata la venonta kongres-lando Serbio kaj la urbo Ĉaĉak, kie ILEI kongresos de la 13-a ĝis la 20-a de julio 2019. Poste prezentiĝis nova estraro de ILEI kaj fine oni debatis pri kongresaj konkludoj kaj aliaj aktivaĵoj. Dum la Internacia adiaŭa vespero aktorizis niaj talentuloj. Ni ĝuis kantojn, diversajn dancojn, poem-deklamadon, ŝercojn ktp.

Bone disvolviĝis AMO-seminario kaj E-Instruista Trejnado (EIT). Katalin Kováts disdonis diplomojn de KER-ekzamenoj al pluraj personoj. Tre sukcesa estis la Lingva Festivalo, kie prezentiĝis trideko da lingvoj. La hispanoj invitis ĉiujn ĉeestantojn al sia venontjara kongreso, kiu okazos komence de majo en Malago, kune kun la IFEF-kongreso.

Merkredo estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj. Ĉi-foje estis elekto inter Toledo kaj Segovio. Ambaŭ proponoj estis allogaj kaj la partoprenintoj estis kontentaj post la reveno. Duontaga ekskurso celis la urbon Alcalá de Henares, kiu estis deklarita Monda kulturheredaĵo de UNESKO, pro sia trajto de la unua universitata urbo en la mondo.

Ni ĝuis tre agrablan kongreson dank' al la bona organizado de niaj hispanaj kolegoj, kiuj multe ŝvitis dum tiuj varmegaj tagoj.



Peter den Breems  
Nederlando

## Rememoroj pri la ĉijara Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno

Denove allogis min la feriado en la loko malproksima, malantaŭ la horizonto, nome en la pola Mielno, kie okazis jam la 40-a Ĉebalta Esperantista Printempo, dum la 12 – 23-a de junio. Jam multfoje mi tien vojaĝis, por praktiki la lingvon de Zamenhof. Okaze de la jubilea aranĝo, trarigardante mian hejman dokumentadon, mi konstatis, ke tio okazis jam 14-foje!



La unua kialo, por denove veturi al Mielno, estis mia emo ankoraŭfoje subiri la etoson, kiun donas Esperanto. Ja dum tiuj renkontiĝoj mi renkontas homojn el diversaj landoj, kun kiuj mi alie neniam interkonatiĝus, homojn kun iliaj lingvoj, ofte malfacilaj (kiel, ekzemple, la pola), samideanojn uzantaj Esperanton, kiu forprenas la lingvajn barojn. Dum tiaj aranĝoj povas okazi amikiĝoj kaj ankaŭ amo povas embuski...

Alia kialo, por ĉijare viziti Mielno, estis por mi ricevi tie memoraĵon pri la premio, sekve de mia kontribuo al la poezia konkurso „Ĉe la rivero Vistulo”, anoncita en 2017, okaze de la festata tiam en Pollando „Jaro de Vistulo”.

Kaj fine, mi volis partopreni la aranĝon, pro la kvardeka jubileo de ĈEP kaj denove renkontiĝi kun nia kara Stanislavo Mandrak, kiu ankaŭ ĉijare estis la ĉeforganizanto.

La 13-an de junio, en la bonege renovigita parto de Sporta Hotelo, nia jam tradicia feriado, okazis pli-malpli formala inaŭguro. Venis por ĝi vicprezidento de la komunumo Mielno-Uniście. Okaze de la jubileo, estis remorigata historio de la ĝisnunaj Printempoj per rakontoj pri antaŭaj organizantoj (el inter kiuj mi persone konis sinjorojn Czesław Baranowski kaj M. Łaba), per diversaj malnovaj dokumentoj kaj albumoj kun malnovaj fotoj. Ĝojiga estas la informo, ke oni planas daŭrigi la renovigon de la aliaj partoj de la hotekomplekso laŭ la nuntempaj postuloj.

La feriadon partoprenis proksimume 40 personoj kun malmultaj eksterlandanoj.



Esperantistoj el aliaj landoj estas ĉiam gravaj, por ke oni nature uzu la internacian lingvon kaj plibonigu ĝian parolnivelon. La programo de la aranĝo, jam tradicie, grandparte baziĝis sur la ripozado, distrado ĉe la marbordo. La vetero por tio estis ĝenerale bonvolema. Tamen, ni kreis ankaŭ konversacian rondon, dum niaj ĉiutagaj renkontiĝoj per si mem elmontriĝis diversaj lingvaj malfacilaĵoj, gramatikaj obstakloj. Feliĉe, en nia rondo denove troviĝis nia eminenta Teresa Nemere, kiu multe al ni klarigis. Kiel kutime, estis interesaj prelegoj. Ĉijare, en la programon trudis sin

ankaŭ mondĉampionado de piedpilko. Por poloj, precipe por viroj, ĝi estis grava, ĉar Pollando partoprenis, do blank-ruĝaj atributoj estis videblaj interniaj partoprenantoj.

Bone estis, ke denove formiĝis grupo de kantemuloj kaj ĉiun posttagmezon ni povis kanti. Stanislavo projektis la tekstojn sur ekrano kaj gaja kaj lerta muzikistino Halina Rózanek el Szczecin kontribuis per sia akordiono.

Ni havis ankaŭ agrablan dancvesperon, gvidata de nia tradicia gastmuzikisto kaj kantisto Stanislavo Stokrocki. Badaŭrinde, por la dua planita dancvespero li ne povis veni pro malsaniĝo. Ne okazis ankaŭ la kutima bivakfajro, por adiaŭo, ĉar ĝuste, tuj antaŭ la planata vespero, la ĝenerale bona vetero subite sanĝiĝis kaj forte ekpluvis. Fine, la adiaŭa vespero okazis en nia manĝejo. Ni abunde povis manĝi, trinki (bierumi) kaj denove nia kara akordionistino instigis nin por kanti.

Menciinda estas nia vizito en la najbara urbo Koszalin. Gvidis nin tie la lokaj esperantistinoj: Bożena Lajten kaj Regina Zdunek. Ni rigardis la grandan memorŝtonon – Esperanto monumenton kaj ankaŭ la kverkon de paco, kiun Regina mem helpis planti la 22-an de majo 1978, do jam antaŭ 40 jaroj!

Alia grupo vizitis ankaŭ la urban tombejon, kie, rememorigante la konatajn, meritplenajn esperantistojn Ewa Siurawska kaj Czesław Baranowski, oni omaĝis iliajn tombojn per floroj kaj kandeloj.

Antaŭ nia disiro hejmen, vizitis nin reprezentantoj de la loka televido – ĵurnalistino kun kameristo. Okazis, ke la ĵurnalistino konis Esperanton kaj povis mem intervjui ankaŭ eksterlandajn partoprenantojn. Samvespere ni jam povis rigardi la registritan renkontiĝon pere de televido.

Mi tre ĝojas, ke mi denove povas ririgardi la sukcesan, agrablan feriadon, kiun mi travivis danke al Esperanto.

---

*Teresa Nemere*

## Vespero kun „Sinjoro Tadeo” en Toruń

Torunaj esperantistoj invitas por la oksterordinara *Vespero kun „Sinjoro Tadeo”*, kiu okazos la 19-an de oktobro en Toruń, en la urba Centro de la Nuntempa Arto. Dum la festata ĉijare la 100-jara datreveno de liberiĝo de nia lando, ni volas omaĝi ankaŭ la 100-an datrevenon de la unua

eldono de la tradukita al Esperanto „Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz. En Toruń tio estas speciale grava, ĉar la tradukinto de la fama pola epopeo - Antoni Grabowski estas abituriento de la iama Reala Gimnazio en Toruń kaj nun, okaze de la 450-a jubileo de tiu lernejo (kies tradicion daŭrigas la nuna Nikolao Kopernik Liceo), li estas omaĝata kiel unu el ĝiaj eminentaj lernantoj.

Programo de la vespero celas larĝe informi kaj entuziasmigi la urban publikon pri Esperanto kaj ankaŭ ĝojigi esperantistojn. Ni preparas pollingvan prelegon pri Antoni Grabowski, kiel pioniro de Esperanto kaj eminenta tradukanto, kaj prezenton de esperantigitaj fragmentoj de „Sinjoro Tadeo” fare de la profesia aktoro el la toruna teatro. La tuton muzikornamos eminenta cimbalo.

Aldone ni povos spekti filmigitajn fragmentojn de la spektaklo „Sinjoro Tadeo”, prezentata en Esperanto, jam antaŭ multaj jaroj, de la junulara teatro Studio „P” kaj ekspozicion de 4 ĝisnunaj eldonoj de la esperantigita verko de Adam Mickiewicz.

Ni kore invitas, por kune festi. Por gastoj el ekster nia urbo, ni pretas prepari aldonan programon.

Interesiĝintoj, bonvolu kontakti kun Teresa Nemere rete: [teresa.nemere@op.pl](mailto:teresa.nemere@op.pl) aŭ telefone: 601 141 439.

## Mojose

*Mariusz Hebdzyński*

### Esperanto ĉe Slot Art Festival 2018: viva lingvo en revivigita monaĥejo

Rakontas Mariusz Hebdzyński, instruisto dum la festivala Esperanto-kurso.

Ĉiam en julio, grandega, duonfalinta eks-monaĥejo en Lubiąż ekvivas denove post unujara dormo – jen kion signifas komenco de Slot Art Festivalo. Sur verdaj herbejoj, ĉirkaŭantaj la imponan historian konstruaĵaron, denove amasiĝas homoj kun siaj aŭtoj kaj tendoj, svarmas gajaj infanoj, grupiĝas malnovaj konatoj... Hej, kelkaj el ili ĵus pendigis sur tendo flagon kun verda stelo!

Ja, ĉe SLOT ne povis manki mi, Roma, Goŝka kaj Kubo F, ĉar tiu festivalo, laŭ pluraj kategorioj, estas unika en sia speco. Kaj ne nur pro tio, ke absoluta malpremeso de alkoholaĵoj devigas vin trinki senĉese novan botelon de Yerba Mate, kvazaŭ en ia "gufujo". Ankaŭ iom simile, kiel dum Esperanto-aranĝoj, en tiu mirinda festivalo oni verŝajne ne trovus eĉ unu homon, por kiu la muzika oferto estus la decida argumento por veni – malgraŭ 10 diversstilaj scenejoj! Fakte, la plej mojosa faktoro de la aranĝo estas pli ol 150 diversaj metiejoj, okazantaj dum kvar tagoj de mateno ĝis posttagmezo, en tri-sesia vicordo.




Estas kursoj de dancado, kantado, sportumado, manfarado de artaĵoj, diskutoj pri gravaj defioj de la moderna mondo... Kaj verŝajne eĉ tia abundeco ne sufiĉas, por satigi la scivolemon kaj lernavidecon de festivalaj gastoj, ĉefe adoleskantoj. „Ĉu daŭre estas loko en via kurso?“ – demandis dube knabino, preterpasanta la improvizitan klasejon de Esperanto-kurso, kiu ŝajnis esti plenplena. Jes, malgraŭ “tro” sukcesa interesiĝo pri la kurso, ŝi rajtis aliĝi kiel la 35-a persono: komence solvi kvizon, poste krei Esperantan nomon por si kaj fine de la leciono, ekkanti kune kun ĉiuj aliaj en la novlernita lingvo.

Mi persone elkore esperas, ke la afabla etoso, kreemo kaj malfermeco je la mondo, allogos venontjare ankoraŭ pli multajn junajn kuraĝulojn, pretaj eksperimenti per Esperanto. Ĉiuj memoru, ĝi estas konstruita kvazaŭ de Lego-brikoj!



semajnoj okazis finalo de la biciklista vetkuro "Tour de Pologne". Alveninte al Szczyrk Centrum, kelkaj samideanoj ĝuis gustumadon de la loka manĝaĵo en la regiona restoracio „Stary Młyn”. Tiu partopreninda pilgrimado estis organizita de PEA-filio en Bielsko Biała.



Jean Marc Leclercq

## La socia inertece

Se ni povas nomi la tempon de reago de la cerbo de unu persono, kiu ricevas novan informon "persona inertece", ni ankaŭ povas nomi la tempon de reago de la socio antaŭ la nova situacio "socia inertece". Ŝajnas, ke la dua inertece estas multe pli granda ol la persona.

Jen la ŝoka ekzemplo:

La uzo de tabako estas la ĉefa kaŭzo de eviteblaj mortigoj en la mondo (6.000.000 viktimoj jare pli ol 60.000 en Pollando, 73.000 en Francio) inter kiuj oni devas bedaŭri 10% da pasivaj fumantoj (homoj, kiuj ne fumas, sed malsaniĝas pro la fumo de aliaj personoj, fumantaj ĉirkaŭ ili). La sciencistoj komencis tion kompreni sufiĉe frue. La germana alergiolego Frantz H. Müller jam prilaboris la temon en 1939, kaj poste, la brita Richard Doll kontinuigis la esploron dum kaj post la dua mondmilito. Jam en la 1950-aj jaroj, la fenomeno estis konata en la sciencista mondo.

La unua leĝo, limiganta fumadon en Pollando, aperis en 2010. Norvegio estis la unua kaj malpermesis fumadon en publikaj ejoj en 2004. Kial pasis tiom da tempo inter tiuj du decidoj? Tio estas la socia inertece. Ĝi sekvas ĉiam pli malpli la saman skemon:

1/ La informo estas nekonata de la publiko. ("La problemo ne ekzistas")

2/ La informo estas neita. ("Tio neveras")

3/ La informo estas diluita. ("Estas pli ĝenerala problemo")

4/ La informo estas kontraŭita. ("Aliaj sciencaj serĉoj montras la malon")

5/ Oni uzas la ekonomian argumenton. ("Sed tio kreas laboron")

6/ La solvo estas rifuzita de iuj personoj. ("Ne gravas, oni devas tamen morti pro io")

Ni nun estas en la jaro 2018 kaj tio povas nin ŝoki, sed se ni estus en 1958, tiuj diraĵoj pri tabako ŝajnus al ni stultaĵoj, ĉefe pro la socia rolo de la tabako, ligita al iu komforta vivmaniero, kiel alkoholo (kaj nun viando, laŭ kelkaj





reklamkampanjoj). Ni ne forgesu la epokon, kiam soldatoj ricevis tabakon samkiale, kiel uniformoj aŭ armiloj.

Por bone kompreni la 5-an fazon, oni devas scii, ke la firmao Phillips Morris International pligrandigis inter la jaroj 1970 kaj 2008 sian produktadon de cigaredoj de 87 miliardoj ĝis 870 miliardoj kaj la profiton de 425 milionoj de dolaroj al pli ol 63 miliardoj.

Ni estas do ŝokitaj, sed la sperto el pasinta tempo devas helpi nin por la futuro. Ni devas kompari tion kun tio, kio okazas nun kun porkaĵo. La Monda Organizo de Sano deklaris ĝin kancerdona antaŭ kelkaj monatoj, je la sama nivelo de danĝero kiel tabako. La informo, vi rimarkis (aŭ fakte ne rimarkis), ne estas sufiĉe diskonita per amasmedioj.

Se vi parolos pri tio ĉirkaŭ vi, vi vidos, ke ni estas en la fazo 1 de la socia inerteco, tio signifas, ke neniuj scias ankoraŭ pri tio. Se vi kredas, ke vi helpas la homojn informante ilin, vi eraras, kaj vi situigis tuj en la fazo 6. Ni povas tamen peti homoj, ke porkaĵo ne estu donata al infanoj, kiuj ne havas la elektopovon.

Konante la gravecon de la porkaĵa industrio en Eŭropo kaj Usono kaj la politikan povon de iliaj lobioj, ni povas antaŭvidi tre pezan socian inertecon je la priskribita temo. Ni vidos.

---

*Magdalena Tatara*

## Forpaso de Irena Szewińska (1946 - 2018) - elstara pola sportistino.

La 29-an de junio 2018, en Varsovio, forpasis Irena Szewińska - unu el la plej elstaraj polaj sportistinoj. Ŝi praktikis leĝeran atletikon, precipe sprintkurojn kaj longosalton.

Ŝi partoprenis kvin Olimpikojn inter 1964 kaj 1980: en Tokio, Meksiko, Munkeno, Montrealo kaj Moskvo, gajnante sep olimpikajn medalojn: 3 oraj, 2 arĝentaj kaj 2 bronzaĵoj pro kuroj, je 100, 200 kaj 400 m., stafetkuro kaj longosalto. Ĝis nun tio estas la plej bona antiko de pola sportisto dum Olimpikoj. Ŝia olimpika debuto okazis en Tokio, en 1964, kie ŝi gajnis tri medalojn: du arĝentaj pro la 200-metra kuro kaj longosalto kaj oran medalon ŝi venkis kun siaj koleginoj pro stafetkuro 4x100 metroj. Kvar jarojn poste, en Meksiko, ŝi venkis la kuron je 200 metroj kaj estis tria

en la kuro de 100 metroj. En Munkeno, en 1972, ŝi gajnis bronzan medalon pro la kuro, je 200 metroj. Ŝia plej impona sukceso estis ora medalo dum Someraj Olimpiaj Ludoj en Montrealo (1976) en la kuro je 400 metroj, kie ĉeokaze ŝi superis ankaŭ mondan rekordon (49,29). Ŝi estis la unua virino, kiu trakuris tiun distancon en malpli ol 50 sekundoj, jam du jaroj antaŭ la olimpikoj. Ĝis hodiaŭ ŝi estas unika polino, kiu faris tion kaj ŝia rezulto daŭre estas rekordo de Pollando.

Irena Szewińska superis 10 mondrekordojn kaj gajnis 10 medalojn dum la eŭropa ĉampionado en leĝera atletiko: kvin oraj, unu arĝenta kaj kvar bronzaĵ. Krome, ŝi estis elektita kvarfoje kiel la plej bona pola sportisto en la prestiĝa konkurso, organizita de la pola sporta revuo "Przegląd Sportowy".

Post la fino de la sporta kariero, I. Szewińska estis i.a. prezidantino de Pola Leĝeratletika Asocio kaj membro de Pola kaj Internacia Olimpikkomitato. Dum multaj someraj kaj vintraj olimpikoj, ŝi observis sukcesojn de polaj sportistoj kaj dekoris ilin per medaloj.



---

*Adam Wilkus*

## Pri cikonio – simbolo de la pola naturo

Pollando estas konata kiel cikonia paradizo. Ĉiu kvara cikonio, vivanta en la mondo, devenas el nia lando. Tial, krom la blankvosta maraglo (*Haliaeetus albicilla*), fortega kaj bela reĝo de la ĉielo, kiu

videblas sur blazono de la pola ŝtato, la blanka cikonio (*Ciconia ciconia*) estas birdo ofte kunligata kun Pollando.

Ĝi estas bela birdo, kiu vivas proksime al homoj. Ties plumaro estas precipe blanka, kun nigraj partoj enflugiloj. Maturaj birdoj havas longajn ruĝajn krurojn kaj longajn pintecajn ruĝajn bekojn. La blanka cikonio estas granda birdo, kiu havas longon, kaj alton de pli ol unu metro. Ĝia enverguro estas ekde unu metro kaj duono ĝis pli ol du metroj. La birdo pezas inter du kaj pli ol kvar kilogramoj.

Ĉiujare ni atendas signojn de alproksimiĝanta printempo: unuaj folioj kaj floroj, kantantaj birdoj, varma suno. Unu el la elstaraj kaj longe atendataj antaŭsignoj de ĉi-tiu sezono estas la cikonio, revenanta el Afriko al Pollando.



Interesa estas konduto de cikonio dum migrado. Kiam alproksimiĝas vintro ĉe la norda hemisfero, birdoj migras suden, ĉefe pro ebleco aliri al manĝaĵo. Cikonioj migras en neregulaj gregoj. Ni ne vidos ilin sur ĉielo en V-formo,

kiel flugas ekzemple gruoj, anseroj, cigoj aŭ kormoranoj por ŝpari energion. Tamen, ekzistas pli ekonomiaj flugteknikoj, kiujn uzas blankaj cikonioj: anstataŭ svingi siajnflugilojn senĉese - ili ŝvebas, uzante suprenirantajn fluojn de la varma aero. Tiaj fluoj ŝprucas nur super tero, tial tiuj birdoj evitas flugi super la maro. La fenomeno estas junaj cikonioj, ĉar la unuan fojon, kiam ili forveturas el Eŭropo al Afriko - ili ekflugas pli frue ol iliaj gepatroj kaj venas ĝuste al la loko, kien gepatroj celas veni.

Vizitindas vivlokoj de tiu-ĉi bela birdo. Oni povas vidi nestumantajn cikoniojn en multaj regionoj de preskaŭ tuta Pollando, antaŭ ĉio proksime al herbejoj kaj riveroj. Plej multe da nestoj troveblas en la nordorienta parto de nia lando.

En la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento, Eŭropa Fondumo pri Protektado de Natura Heredaĵo „Euronatur” kreis la honortitolon „Eŭropa Cikonia Vilaĝo”, por tiuj komunumoj, kiuj signife kontribuis en sia lando al protektado kaj konservado de lokoj de ovometado kaj



kovado de la blanka cikonio. Hodiaŭ jam estas 15 Cikoniaj Vilaĝoj en la tuta Eŭropo. Nur unu loko en la elektita lando povas esti honorigita per ĉi tiu titolo. La unua titolo de Eŭropa Cikonia Vilaĝo estis donita al la kroata vilaĝo Cigoć en la 1994-a jaro. En Pollando, la vilaĝo Pentowo, proksime al Bjalistoko, en la nordorienta Pollando, ricevis tiun ĉi titolon kiel la sepa - en la jaro 2001. En Pentovo, ĉiujare, ene de nur unu farmbieno, sur arboj, fostoj kaj tegmentoj nestumas ĉirkaŭ 30 cikoniaj paroj.

En ekologie puraj regionoj de nia lando oni povas renkonti nigran cikonion (*Ciconia nigra*). Ĝi estas timida specio. Kutime vidata en paroj aŭ tre malgrandaj aroj en marĉaj areoj, ĉe riveroj aŭ internaj akvoj, precipe apud arbaroj. La nigra cikonio estas iomete malpli granda ol la blanka. Ankaŭ tiu ĉi havas longajn: krurojn, kolon, kaj rektan, pintecan bekon. Ĝia koloro estas ĉefe nigra (kapo, kolo, flugiloj kaj vosto), kun dubeverda kaj purpura brilo. Blankaj estas nur la suba brusto, ventro kaj subvostaj kovriloj; ruĝaj estas la senplumaj partoj de la beko, okulringoj kaj kruroj. Mi vidis

nigrajn cikoniojn sude de Pollando, ĉe la 600-jaraj fiŝlagetoj, fonditaj de la reĝo Kazimiro la Granda en la „Valo de Karpo”, situanta inter Zator kaj Spytkowice, en la iama Princlando de Oświęcim.

La blankan cikionon, en la pola popola kulturo, ĉirkaŭas speciala respekto kaj simpatio. Ĝi ofte aperas en homaj kredoj, proverboj kaj paroladoj. Apud bizonoj kaj salikoj - ĝi estas simbolo de la pola naturo. Ĉi tiu birdo estas identigita kun feliĉo kaj naskiĝo. Se cikonio konstruos neston sur iu tegmento, oni kredas, ke loĝantoj estos feliĉaj, aŭ ke al la familio, loĝanta en la domo, naskiĝos bebo.

Inter la mitoj kun motivoj pri cikonio, la plej grava koncernas ĝian originon. Laŭ la mito, en Pollando kaj en multaj aliaj eŭropaj landoj, oni kredis, ke la cikonio estis farita el homo. Kiam amfibioj kaj reptilioj troe proliferis en la mondo, la Dio kolektis ilin en sako, kaj diris al la viro, ke li portu la sakon al maro kaj verŝu la enhavon en la akvon. Sed la viro ne povis elteni sian scivolemon: li malfermis la sakon kaj tiam ĉiuj amfibioj kaj reptilioj disrampis sur la tero. Dio, kiel punon, transformis la malobeeman senditon en cikionon, por ke ĝi purigu la mondon. De la legendo verŝajne devenas la diraĵo: "Ĉu mi estas cikonio, ke mi purigu la mondon?"

Cikonio estas unu el la antaŭsignoj de printempo. Pri tiu ĉi birdo oni konas multajn proverbojn. Observado de la naturo permesas al



homoj predikti naturajn fenomenojn, veteron, ŝanĝon de sezonoj ktp. Proverboj pri cikonioj ofte baziĝas sur propraj observoj, kaj oni konsideras ilin kiel la saĝeco de prapatroj. Jen kelkaj ekzemploj: "Cikonio venis! Printempo baldaŭas.", „Kiam gruoj venos, laboru en kampo pri pizo. Kiam cikonioj venos, la unua kampo estu jam semita” (gruoj venas jam februare, cikonioj inter marto kaj aprilo), „La

cikonio sur la vosto hirundon kunportas” (hirundoj aperas ĉe ni ĉirkaŭ la 20-a de aprilo), „Se je la sankta Gertrudo (la 17-an de marto) cikonio sur nesto sidos, printempo baldaŭ venos.”, „Se cikonio je la sankta Jozefo (la 19-an de marto) venos, la vintro / neĝo ne plu estos.”, „Je la sankta Francisko (la 2-an de aprilo) ĉio verdiĝas kaj cikonioj el vintrejo revenas.”, „Je la sankta Adalberto (la 23-an de aprilo) cikonio ovon metos.” „Sur la sama paŝtejo, bovo serĉas herbon kaj cikonio ranon.”, „Je la sankta Isidoro (la 10-an de majo) estas tempo por cikonio” (por havigi idojn), „Je la Transfiguriĝo de la Savanto (la 6-an de aŭgusto) cikonioj ekflugu al varmaj fontoj, kaj botaŭroj al la arbaro!”, „Se multaj cikonioj daŭre restas ĉe ni post la sankta Bartolomeo (la 24-an de aŭgusto), la vintro estos malforta kaj la brulaĵo malmultekosta.”

La mondo de bestoj, kaj precipe de birdoj, estas interesa kaj valoras ĝin esplori pli profunde. Mi deziras al vi renkonti cikoniojn kaj mi instigas observi tiujn belajn kaj interesajn birdojn. Oni povas rigardi kelkajn nestojn, loĝataj de cikonioj, pere de la interretaj kameroj.

## Homoj

*Informservo de la komunumo Siedlec*

Tradukis *Robert Kamiński*

### Rememoro pri Antoni Beyga

Sabate, la 5-an de majo, en la aĝo de 84 jaroj, forpasis s-ro Antoni Beyga, longdaŭra pedagogo, esperantisto kaj senlaca propaganto de Esperanto.

Antoni Beyga naskiĝis en 1934, en Grodzisk Wielkopolski. Post la tro frua morto de lia patro, li, kiel junulo, translokiĝis al Zielona Góra, kie li laboris kaj daŭrigis sian edukadon. Li ricevis la mezlernejan diplomon kun altaj notoj kaj poste li akiris pedagogajn kvalifikojn. Baldaŭ li kaj lia edzino translokiĝis al Karna, kie li estis la estro de la lernejo. De 1970, li laboris en la lernejo en Siedlec, kiel matematika instruisto kaj plenumis funkcion de

anstataŭanto, poste direktoro de ĉi tiu edukejo. Li zorgis pri la kooperativo de la lernantoj, dediĉante multan tempon kaj atenton al edukaj aferoj. Kiel pedagogo, li strebis popularigi aktivigajn instrumentojn, kaj ankaŭ larĝskalan uzadon de aŭdovidaj rimedoj, zorgis pri riĉigado de lernejoj per didaktikaj helpiloj.

Dum la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento, li ekkonis la lingvon Esperanto; kiel matematikisto li estis ravita de logiko de ĉi tiu lingvo.

De tiu tempo, li fariĝis granda entuziasmulo de Esperanto kaj senlaca populariganto de ĝia ideo. Tio donis al li eblecon plilarĝigi interhomajn kontaktojn kaj ankaŭ renkontiĝadi kun lernantoj de diverstipaj lernejoj.



Li ĝojis kaj fieris, kiam infanoj en infanĝardeno ekkantis por instruistinoj, dum la *Tago de Virinoj*, bondezirkanton en Esperanto aŭ, kiam, dum hazardaj renkontiĝoj, lernantoj salutis lin en la internacia lingvo.

Pro multaj jaroj de la instruista laboro kaj ankaŭ pro la aktiva socia laboro, li ricevis Oran Krucon de Merito, Krucon de la Kavaliro de la Ordeno Polonia Restituta kaj multajn aliajn premiojn. Antoni Beyga estis ankaŭ aktiva membro de la Societo de Memorigo de Grandpolia Ribelo. Li kunkreis kaj redaktis regionan revuon, "Gminne Wieści".

Forpasis eksterordinara homo, homo plena de pasio kaj interesiĝo pri la mondo, kun la alta persona kulturo, ĉiam bonvolema, bonkora.

Honoro al Lia Memoro!

-----

[http://www.siedlec.pl/wpisy\\_4187\\_294.html](http://www.siedlec.pl/wpisy_4187_294.html)

Por ke aŭskulti Antoni Beyga rigardu filmeton en Youtube:  
<https://www.youtube.com/watch?v=HRiHDTf2DN8>

## La – bazaj reguloj – parto 3

### Plene priskribita

Frazparto povas havi priskribojn, kiuj komprenigas, pri kiu temas:

- *Jen kuŝas la ĉapelo de la patro.* La priskribo *de la patro* klarigas, pri kiu ĉapelo temas. Oni subkomprenas, ke ekzistas nur unu ĉapelo de la patro. Se oni ne uzus *la*, oni do devus supozi, ke ĝi estas nur unu el pluraj ĉapeloj de la patro. Povas ankaŭ esti, ke la aŭskultanto scias, ke unu el pluraj ĉapeloj apartenas al la patro (dum la aliaj apartenas al aliaj personoj), kaj ke nun la parolanto montras ĝuste tiun ĉapelon.

- *Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita.* FE.33 La subfrazo *en kiu li estis naskita* plene klarigas, pri kiu tago temas. Ja ne povas ekzisti pli ol unu tia tago.

- *Por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon.* La vorto *hodiaŭa* plene klarigas, pri kiu tago temas.

- *La kanto de la birdoj estas agrabla.* FE.9 La priskribo *de la birdoj* klarigas, pri kiu kanto temas. *La birdoj* havas *la*, ĉar ili estas alimaniere konataj, eble ĉar la aŭskultanto povas mem aŭdi ilin.

- *Mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi.* La subfrazo *kiun vi pruntis al mi* plene klarigas, pri kiu mono temas. Tamen povus esti, ke antaŭe okazis pluraj pruntoj. Tiam oni normale ne uzus *la*, ĉar tiam la priskribo ne sufiĉus por identigi la prunton. Povus ankaŭ esti tiel, ke la aŭskultanto jam forgesis pri la prunto. Se la parolanto sciis tion, li ne uzus *la*. FE.17 La priskriboj *unua* kaj *ke ŝi nomis ŝin sia filino* plene klarigas, pri kiu fojo temas. Sen *la* ŝajnus, ke ekzistus pluraj unuaj fojoj de tio, kvankam tio estus absurda.

### Nomata

Se post O-vorto aperas propra nomo kiel identiga priskribo, oni ordinare aldonas *la* antaŭ la O-vorto, ĉar propra nomo normale sufiĉas por plene identigi ion:

- *Mi vojaĝis al la urbo Parizo.* La nomo *Parizo* plene identigas la urbon.

- *La sufikso “um” ne havas difinitan signifon.* Per “*um*” oni rekte informas, pri kiu sufikso temas. La sufikso kvazaŭ nomiĝas “*um*”.



Legu pli detale pri *la* kaj propraj nomoj kiel priskriboj.

### **Rekte vidata**

Afero povas esti konata pro tio, ke la aŭskultanto rekte vidas ĝin, aŭ alimaniere rimarkas ĝin:

- ***La domo estas vere bela.*** Tiel oni povas diri, kiam la interparolantoj ambaŭ vidas la domon.

- ***La floroj odoras tre bone.*** Tiel eblas diri, kiam la aŭskultanto mem vidas aŭ flaras la florojn, kaj do facile komprenas, pri kiuj floroj temas.

- ***Atentu pri la ŝtono!*** La alparolato mem povas vidi la ŝtonon, aŭ la parolanto almenaŭ supozas, ke la aŭskultanto pro la averto rigardos kaj ekvidos la ŝtonon.

- ***“Ĉu vi vidas tie la grandan arbon?”*** diris la sorĉistino, montrante ***arbon***, kiu troviĝis apud ili. Temas ambaŭfoje pri la sama arbo. Unue parolas la sorĉistino. La persono, al kiu ŝi parolas, povas mem vidi la arbon (ŝi ja eĉ fingromontras ĝin). Tial la sorĉistino uzas *la*. Poste parolas la verkinto de la fabelo, sed li ne uzas *la*, ĉar la leganto ne povas vidi la arbon.

### **Ĝenerale konata, unika**

Afero povas esti konata, ĉar ĝi estas tute unika, ĉar ekzistas nur unu tia afero, aŭ ĉar ĝi estas tiel elstara aŭ speciala, ke povas temi nur pri ĝi:

- ***La ĉielo estas blua.*** Ĉiuj scias, ke ekzistas ĉielo. Oni povas do nomi ĝin simple *la ĉielo*.

- ***La suno brilas.*** Ja ekzistas multaj sunoj, sed kompreneble temas pri la suno de nia planedo. Ofte oni eĉ uzas *la Suno* (kun majusklo) kiel propran nomon de nia suno.

- ***La filo de la reĝo ŝin renkontis.*** La parolanto supozas, ke la aŭskultanto scias, ke ekzistas reĝo en la priparolata lando. Pro la uzo de *la* la aŭskultanto komprenas, ke temas pri ĝuste tiu reĝo. La aŭskultanto eble ne scias, kiom da filoj havas la reĝo, sed ĉar la parolanto diris *la filo* la aŭskultanto povas kompreni, ke li havas nur unu filon (aŭ eble nur unu atentindan filon), kaj ke ĝuste tiu filo ŝin renkontis.

- ***La prezidento de Usono diris, ke...*** La parolanto supozas, ke la aŭskultanto scias, ke Usono havas ŝtatprezidanton, kaj nur unu. Pro tio eblas nomi lin simple *la prezidento de Usono*. Se oni dirus *prezidento de Usono* sen *la*, tiam la aŭskultanto komprenus, ke temas pri iu el la antaŭaj prezidentoj de Usono, sed certe ne la nuna (ĉar, se estus la nuna, oni nepre uzus *la*).


- ***La eŭropanoj ekkonis Amerikon en la dek-kvina jarcento.*** Supozeble ĉiuj scias, ke ekzistas eŭropanoj. Supozeble ĉiuj ankaŭ scias, ke ekzistis dek-kvina jarcento. Se tamen hazarde la aŭskultanto ne konus la

eŭropanojn, li tamen pro la uzo de *la* informiĝas, ke ekzistas nur unu tia grupo, kaj temas pri (pli-malpli) ĉiuj el ili.

## Literaturaĵoj

Lidia Ligęza

### El poezio kaj prozo de Bolesław Leśmian



**Bolesław Leśmian** – vivanta inter la jaroj 1878 kaj 1937, estis la plej interesa, en Pollando, poeto de modernismo kaj intermilita periodo. En la jaro 2017 oni omaĝis la 80-an datrevenon de lia morto. La poemojn kaj prozaĵojn de la aŭtoro mi elektis el multaj liaj verkoj, por traduki al Esperanto, pro lia filozofio, la lingvaj majstreco kaj eltrovemo kaj ankaŭ pro eksterordinara humursento.

Mi scipovis mian entusiasmon por poezia prozo de Bolesław Leśmian transdoni al la konata esperantistino - aktorino Jadwiga Gibczyńska. Apoge je du tekstoj el la ciklo „*Klechdy polskie*” – *Johano Sekretulo kaj Majnimfo*, ni ambaŭ verkis la monodramon, titolita „*Slavaj fabeloj*”, kiun Jadwiga prezentis unuan fojon, dum Teatra Festivalo en Gdańsk, en la jaro 1977. Poste, ĝi estis prezentata kadre de diversaj Esperantaj aranĝoj kaj feriadoj en Krakovo, Staszów, Międzygórze kaj dum Universala Esperanto-Kongreso en Lucerna (1979). Ĝis nun sonas en miaj oreloj voĉo de la elstara artistino, recitanta: „Ĉio okazas sur tiu kaj sur alia mondoj, ĉar pro tio ekzistas tiuj mondoj samgepatraj, por ke ĉio sur ili, laŭ la ebleco okazadu.” Ankoraŭfoje Jadwiga Gibczyńska revenis al la verko de Leśmian, en la jaro 2002, prezentante la monodramon en Urbocentra Kulturdomo en Krakovo, kie funkciis Esperanta Sceno ARENO, fondita de ŝi. Dum alia spektaklo de ĉi Sceno ni triope: Jadwiga Gibczyńska, Janina Rżany kaj mi, prezentis laŭvican fabelon el tiu ciklo – titolita *La nigra kapro*.

## Serpento

Ĝardenon verdan iris knabin',  
Ĉe aln' serpento atakis ŝin,

Sufokis korpon per torda ĉen',  
Kareson donis kun la venen'.

Ampleksis ilin komuna ord'  
Dum sonĝaj svenoj de am-agord',

Kaj pro mort-firma volupto-prem'  
La samaj siblo, tordiĝo, trem'.

"Rampul-kutimojn vi konas jam,  
Permesu esti homo en am',

Trezorojn prenu de sub la ter',  
Finiĝos sonĝo – komencos ver'!"

"Ne perdu skvamon, gravas neni',  
Nenion krom vi bezonas mi.

Ŝatas mi kiam pikila lang'  
El lipo suĉas troon da sang',

Kiam tordiĝas dum nia rit'  
Vi, kap-frapante sojlon de lit',

Al vi sin klinas korpo kaj kor'!  
Nek mankas al mi homo, nek or',

Dolĉe vevenas min la saliv',  
Restu serpento ĝis fin' de l' viv'!"

## Papavo

Ĉe barilo ŝi staris branĉara  
Kaj arbuste insidis koŝmaro –  
Kampdemono ŝin premis kaj fleksis  
Per muskoloj la korpon aneksis!  
Kaj ekkantu kantulo –  
Divenu divenulo!  
Per muskoloj la korpon aneksis.

Per spir' lia ŝi spiris kaj ĝemis,  
Per trem" ŝia subite li tremis,  
Ŝin ofendis per lipaj ekscesoj,  
Senfortigis per kampaj karesoj!  
Kaj ekkantu kantulo –  
Divenu divenulo!  
Senfortigis per kampaj karesoj.

Ŝiajn manojn kaj gambojn amoris,  
Ŝiajn spirojn amoris, finvoris,  
Kaj ridaĉe li ĵetis fojn-liton

Ĉi-knabinon de si perfortitan!  
Kaj ekkantu kantulo –  
Divenu divenulo!  
Ĉi-knabinon de si perfortitan.

„Kien iri? Al tombejoj kiaj?  
Kiel dece renkonti kun Dio?  
Nek post peko surgenui drasta,  
Nek krucsigni per mano malĉasta”.  
Kaj ekkantu kantulo –  
Divenu divenulo!  
Nek krucsigni per mano malĉasta.

Menciinte lian buŝon, mavon,  
Ŝi deŝiris la ruĝan papavon  
Kaj hontante, time kaj malĝoje  
Ŝi krucsignis sin per flor’ trifoje!  
Kaj ekkantu kantulo –  
Divenu divenulo!  
Ŝi krucsignis sin per flor’ trifoje.

„Vi apertu sur ĉiel-ebeno  
Ĉiujn pordojn al mia bieno,  
En ĉielo mi volas knabinon  
Kun papave signita animo!”  
Kaj ekkantu kantulo –  
Divenu divenulo!  
Kun papave signita animo.

## Saĝulaj pensoj

*Andreo Bach*

### Ni rigardu supren, ni rigardu la ĉielon

Ni estas pelitaj de ĉiutagaj aferoj, de miloj da devoj kaj senĉesaj problemoj. Ni do al kutimiĝis mallevi nian kapon, por povi rigardi la vojon, kiu estas antaŭ ni, ĉar ni ja devas preterlasi tiun aŭ alian baron. La vivaj baroj ĉiam akompanos nin, ili ĉiam estos sur nia vojo. Sed, kiam ni levos

nian kapon, ni ekvidos eble belan, bluan ĉielon. Kaj eble sur la fono de la blua ĉielo ni ekvidos blankajn nubojn. Antaŭ niaj okuloj ekaperos mirinda spektaklo, kiu ŝanĝiĝas de minuto al minuto kaj estas ofte tre dinamika.



Kiam vi lastfoje rigardis la ĉielon?

Rigardu la nubojn, kiuj translokiĝas digne. Kvankam ili estas tre pezaj, tamen facile ŝoviĝas alte super niaj kapoj per nevidebla forto de aerfluo. Rigardu kiel ŝanĝiĝas iliaj formoj kaj kiel alvenas ĉiam pli novaj nubetoj kaj nubaĵoj, de unu flanko de la horizonto al la alia. Estas bela kaj

fascina fenomeno, kiun nemultaj el ni urboloĝantoj kutimas admiri per propraj okuloj. Por povi raviĝi per tiuj bildoj, oni devas eble iom forveturi ekster domarojn, kie la ĉielo estas senvuala, kie la spaco estas malfermita.

Kiam ni ekvidos ĉiujn tiujn ŝanĝojn, kiuj okazas malgraŭ nia volo, ni komencas pensi, pensi tute alie, ol tio okazis ĝis nun. Ni subite komencas rimarki, ke estas io pli, ol nur tio, kion ni al kutimiĝis vidi ĉiutage ĉi tie, malsupre, sur la disponigita al ni peco de tero. Indas ekpensi, ke la mondo plejparte apartenas al ni ĉiuj, ke ni ja havas ian rajton elekti nian sorton. Anstataŭ tio, ĉiam pli multe da leĝoj ĉiutage malliberigas nin, por ke ni estu pli sekuraj kaj pli feliĉaj, kaj oni diras al ni, ke laŭvicaj preskriboj, celas nuligi niajn proprajn malsufiĉojn!?

Indas do ekpensi, ke ni estas homoj liberaj, la homoj kiuj pensas, ne kiel volus eble kelkaj mondpotenculoj, kiuj per siaj globalaj agoj klopodas stiri nin, kreante fikciajn bezonojn kaj al kutimiĝojn de la nuntempa homo. Jes, jes, la homo hodiaŭ ĉesis mem elekti, atendante la proponojn por solvi problemojn, proponojn, kiujn sufloras diversaj ruzuloj ŝajne por ni, sed fakte pli por sia propra profito. Kiam la homo mem ĉesas pensi, tiam li simple subiĝas al la pensado de aliaj, kaj senkonscie komencas sekvi la aliajn. Kiam oni ne pensas, oni fariĝas aŭtomato, aŭ eĉ sklavo. Oni tiam ripetas ĉiutage la samajn kondutojn, kiujn ekzemple sufloras televidreklamoj, grandskale kreitaj de inteligentaj specialistoj pri la homa psiko, kaj oni pensas, ke ĉio estas en ordo, ke tiel ja devus esti.

Kiam ni anstataŭ tio komencas memstare pensi kaj povas elekti el inter pluraj eblecoj, tiam nia vivo povas ŝanĝiĝi kaj videble pliboniĝi. Ĉiu el ni estas alia, kaj tio, kio estas bona por la sinjoro X, ne devas aŭtomate esti bona por la sinjoro Y. Ĉiu el ni estas neripetebla partiklo de la naturo, pridonacita per la kapablo pensi – ni vere ne forgesu pri tio!

Estante la partiklo de la naturo, ni devus kondukti nature, sed por kondukti nature, ni devas liberigi nian propran kapablon pensi, kaj ni devas postuli la rajton elekti, decidi por nia propra profito, kiu profito por ĉiu el ni povas kaj devus esti iom alia.

Rigardu do la ĉielon. Supre estas multe da libera spaco. Valoras rigardi tien por malfermiĝi al novaj eblecoj, por denove komenci pensi. Levu la kapon kaj pripensu, ĉu vi ankoraŭ realigas viajn proprajn ideojn, aŭ eble aliaj homoj jam sufloris al vi, kion vi faru? En la mondo, kaj supre kaj malsupre estas multe da libera spaco por ĉiuj homoj. Ni nur devas ekpensi, sed tio ĉi ĝuste estas libera elekto.

## Leterkesto



*Katalin Kováts*

### Estimataj polaj membroj de edukado net

Mi skribas al vi, por atentigi vin pri la eblo trapasi la KER-ekzamenojn en Poznan, dum la kultura aranĝo "ARKONES". La antaŭa KER-ekzameno en Poznań okazis en la jaro 2009.

Pri la ekzamenoj vi trovas informojn ĉe  
<https://edukado.net/ekzamenoj/ker>.

Sciendas nepre, ke la ekzamenojn organizas UEA, kunlabore kun la hungara ekzamencentro ORIGO, laŭ la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro.

La kvarlingvan atestilon, aprobitan de la hungara ŝtato kaj renoma budapeŝta universitato ELTE, pluraj sukcesis jam validigi dum siaj studoj kaj laboro, akiri kredit-poentojn aŭ aliajn avantaĝojn.

Kaj entute estas bone fiere anonci al ajna dubulo pri la seriozeco de nia lingvo kaj diri, ke jam pli ol 2200 personoj el pli ol 70 landoj akiris la renomajn atestilojn pri siaj lingvaj konoj. En Pollando estas 40 diplomitoj. Ĉu vi estas unu el ili?

Dum la nuna sesio en ARKONES, la 22-an kaj 23-an de septembro, eblas trapasi kaj la parolajn kaj la skribajn ekzamenojn; aparte aŭ kune. Pri

la detaloj kaj postuloj, serĉu informojn ĉe la ekzamenpaĝo kaj ties subpaĝoj:  
<https://edukado.net/ekzamenoj/ker>.

La ekzameno povos okazi nur tiam, se aliĝos ĝis la 10-a de septembro almenaŭ 10 personoj. Do, ne hezitu tro longe, aliĝu tuj:  
<https://edukado.net/alighilo?id=2018PL-ARKO>

Por pliaj informoj kaj klarigoj, turnu vin al Katalin Kovats (ker-ekzamenoj@edukado.net).

<http://www.arkones.org/eo>



[www.pej.pl](http://www.pej.pl)

## Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo en Katowice

Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo (ĈAR), estas la semajnfina renkontiĝo por tiuj, kiuj komencis lerni Esperanton antaŭ relative nelonga tempo kaj volas praktiki ĝin en la vivanta medio, kaj por tiuj, kiuj simple volas renkontiĝi kaj ekkoni interesajn lokojn, proksimaj al la pola landlimo. Ĉi-jare ni invitas vin al malproksima de la landlimo urbo Katowice, ekde la 5-a ĝis la 7-a de oktobro.

La skiza programo baldaŭ aperos en nia retpaĝo, sed jam nun ni povas malkaŝi, ke en ĝi troviĝos ekskurso kaj urboludo tra Katowice, kvizo pri Esperantaj kulturo kaj movado kaj ankaŭ eta ateliero por progresantoj. Do, se vi ŝatus praktiki Esperanton kun aliaj junuloj, aŭ se vi volas ekkoni iom pli da strangaj vortoj en Esperanto – tiu ĉi evento estas por vi!

Krome, paralele al la programo de ĈAR en Katowice, okazos la sekva Esperanto-ateliero – por tiuj, kiuj volas komenci lernadon de Esperanto. Pliaj detaloj aperos jam baldaŭ!

La detalojn vi trovos ĉe la retpaĝo <http://ĉar.pej.pl>.



[www.pej.pl](http://www.pej.pl)

## Junulara E-Semajno: festu la jarŝanĝon en Esperantujo

Festi la jarŝanĝon kaj la novjaron kun esperantistoj? JES!

JES – Junulara Esperanto Semajno – estas tradicia evento de Pola kaj Germana Esperanto-Junularo, kiu okazas ĉiujare ĉirkaŭ jarŝanĝo. Ĉi-foje ni invitas vin al Germanio, al Storkow – urbeto, kiu troviĝas nur ĉirkaŭ 45 km de la landlimo, inter Pollando kaj Germanio!

Kune kun pli ol 200 homoj, el minimume 20 landoj, ni babilos, diskutos, lernos, ludos, festos kaj ĝuos ene de la unika etoso!

Atendas vin agrabla tempo, renkontiĝoj kun interesaj homoj kaj multaj bonaj travivaĵoj! Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe: [jes.pej.pl](http://jes.pej.pl).



## Kalendaro - 2018

1-3.06 2018	31-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo en Kulturcentro Podgórze (Centrum Kultury Podgórze), str. Sokolska 13 en Krakovo, <a href="http://www.ckpodgorza.pl">http://www.ckpodgorza.pl</a>	Krakova Societo Esperanto <a href="mailto:kse.krakovo@gmail.com">kse.krakovo@gmail.com</a> <a href="http://www.kse.cba.pl/aligxilo/">http://www.kse.cba.pl/aligxilo/</a>
9.06. 2018	Esperanto-stando dum 22-a Scienca Pikniko en Varsovio ĉe Nacia Stadiono „PGE Narodowy”	Varsovia Filio de Pola Esperanto-Asocio <a href="mailto:alvamo@wp.pl">alvamo@wp.pl</a>
17.06. 2018	Montara Renkonto sur Ĉantorio la Granda en Beskidy Montaro	<a href="mailto:suchanekj@seznam.cz">suchanekj@seznam.cz</a>
12-23.06. 2018	40-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno	Filio de Pola Esperanto-Asocio en Gliwice <a href="mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com">stanislaw.mandrak@gmail.com</a>
2-4.08. 2017	Esperanta stando dum PolAndRock Festival - en Kostrzyn, ĉe la rivero Odra. Renkontiĝo por memzorgantoj ene de la granda rokmuзикfestivalo	Centro de Interkultura Edukado Halina Komar <a href="mailto:halinakomar@gmail.com">halinakomar@gmail.com</a>
1-9.09. 2018	51-a Internacia Esperanta Feriado en Łądek Zdrój	Silezia Esperanto Asocio Teresa Pomorska, <a href="mailto:pomer@wp.pl">pomer@wp.pl</a>



7-9.09. 2018	Esperanto sur la Strando - 2018 Gdynia – Sopot. Temo: „Nia m/s „Zamenhof“	Triurba Esperantista Asocio TORENTO torentosopot@wp.pl <a href="https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/">https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/</a> FB – esperantowsopocie.pl
21-23.09. 2018	34-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto „Arkones 2018” en Poznań	E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo Ludoviko Zamenhof en Poznań. <a href="http://www.arkones.org/eo/">http://www.arkones.org/eo/</a>
13-14. 10.2018	42-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Częstochowa	Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl
14.10.201 8	Patriota kanto laborejo en pola kaj Esperanto en L. Zamenhof-centro en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo pwierzbowski@gmail.pl
9-11.11. 2018	Esperantista renkontiĝo GRUPE - 22 en Gliwice	PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ: staman@ka.onet.pl
14-16.12. 2018	19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko	Bjalistoka Esperanto-Societo pwierzbowski@gmail.pl
28.12- 4.01 2019	10-a JES Junulara Esperanta Semajno en Hirŝluĥ (Storkow-Mark) apud Berlino.	Pola Esperanto-Junularo <a href="http://www.pej.pl">www.pej.pl</a> , <a href="http://jes.pej.pl/2016/">http://jes.pej.pl/2016/</a>

### Popularaj Esperanto-aranĝoj en najbaraj landoj

27.12- 3.01.2019	17-a Novjara Renkontiĝo (NR) - en Wiesbaden, Germanio	EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 10551 Berlin. - retadreso: <a href="mailto:lu.esperanto@gmx.de">lu.esperanto@gmx.de</a>
27.12- 3.01.2019	Luminesk' - en Königswinter apud Bonn, Germanio	Andreas Diemel, Andreas Diemel, Bismarckstr. 168, 47057 Duisburg, Germanio. - retadreso: <a href="mailto:andreas.diemel@web.de">andreas.diemel@web.de</a>
3-7. 01.2019	Poludnica 2019, 37-a Internacia renkontiĝo de vojaĝantoj-esperantistoj en vilaĝo Liptovský Ján (Malaltaj Tatroj, Liptov-regiono), Slovakio	Liptova Esperanto-klubo, Školská ul. 4, 031 01 Liptovský Mikuláš, <a href="mailto:poludnica83@gmail.com">poludnica83@gmail.com</a> <a href="http://www.poludnica.esperanto.sk">www.poludnica.esperanto.sk</a>

1-9.05. 2019	Esperanto-renkontiĝo Mirinda Lviv - en Lvov, Ukrainio	Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. -: tel. +38 (097) 4403172, retadreso volodomir@ukr.net. <a href="http://aromajalto.ukrainio.org.ua/">http://aromajalto.ukrainio.org.ua/</a>
7-10.06. 2019	96-a Germana Esperanto-Kongreso - en Neumünster, Germanio	Deutscher Esperanto-Bund e.V., s-ino Sibylle Bauer, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. - retadreso: sibylle.bauer@esperanto.de
6-14.07. 2019	55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj - en Panevežys, Litovio	Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio. - retadreso: litova.ea@mail.lt

**17-a Novjara Renkontiĝo (NR)** - en Wiesbaden. Kutime ĉ. 150-200 gastoj, inter ili sesdeko da infanoj kaj junuloj. Apartaj programeroj por junuloj sub la nomo "Novjara Internacia Semajno" (NIS). Konversacia rondo kaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

**LUMINESK'** estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi nun okazos la kvaran fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj. Ĉi-foje ĝi okazos en Königswinter apud la konata rivero Rejno.

**Poludnica 2019.** Tradicia vintra renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj kaj turistoj ekde la jaro 1983. La kuranta kvara jardeko de la renkontiĝoj jam havas internacian karakteron kun riĉa kelktaga programo, kie krom turismaj programeroj estas pluraj sportaj aktivecoj, prelegoj pri vojaĝoj el la tuta mondo kaj informoj pri praktikaj scioj de vojaĝantoj.

**Mirinda Lviv - en Lvov.** Esperanto-renkontiĝo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun la kultura ĉefurbo de Ukrainio.

**55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj** estas tradicia esperantista aranĝo organizata ekde 1959 laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio kun riĉa kaj serioza movada, eduka, instrua, kultura kaj ekskursiva programo.

## El amo al Esperanto – estiĝo kaj eldono de la plej nova Esperanto-lernolibro

*Sukceso per Esperanto* estas ĵus eldonita Esperanto-lernolibro por poloj, verkita de Edward Malewicz.

La lernolibro plenumas ĉiujn normojn de la moderna lernilo de fremda lingvo, en la 21-a jarcento. Ĝi en sistema kaj pripensita maniero instruas ĉiujn kvar lingvajn kapablojn: aŭskultadon kun kompreno, paroladon, legadon kun kompreno kaj skribadon. Ĝi estas laŭaspekte alloga kaj riĉe ilustrita (ĝi enhavas ĉirkaŭ 170 ilustraĵojn (fotoj kaj desegnaĵoj). Fascina estas la enhavo de la lernolibro, abunda je interesaj, nebanalaj, atentokaptaj tekstoj pri neordinaraj kaj amuzaj okazaĵoj. La lernolibro enhavas multe da grava kaj interesa vortprovizo, interalie tiu, kiu estas uzata de la juna generacio de la 21-a jarcento. La gramatiko estas zorgeme dozata kaj instruata per serio da diverstipaj ekzercoj kaj taskoj, vekantaj interesiĝon de la lernantoj, kaj ne enuon aŭ laciĝon.

*Sukceso per Esperanto* estas lernolibro maksimume facila kaj lernanto-amika, kaj samtempe senĉese profundiganta la sciojn kaj lingvokapablojn de la lernantoj. La lernantoj ŝatas kaj laŭdas ĝin.

La tuta kompleto de *Sukceso per Esperanto* konsistas el tri volumoj (plus Esperanta-pola kaj pola-Esperanta vortaro, kiu ankoraŭ estas verkata). La du unuaj volumoj enhavas materialon por komencantoj, kaj la tria, por mezprogresintoj. La tria volumo enhavas materialon malmulte konatan, malmulte komprenatan kaj malmulte (aŭ eĉ tute ne) uzatan de polaj E-parolantoj: participojn, kunmetitajn tempojn en la aktiva kaj pasiva voĉoj kaj kelkajn fremdajn por poloj lingvajn konstruojn, ekz. atribujajn ag-propoziciojn kaj ec-propoziciojn, perfektan kondicionalon k.a.

Ekde 2011 mi testis la lernolibron dum kelkaj jaroj en kelkaj kursoj, kaj mi konstatis, ke ĝi estas amika ankaŭ al instruistoj. Ĉiu instruisto, eĉ komencanta kaj malmultsperta, kia mi komence estis, dank' al tiu lernolibro ĝuste kaj korekte gvidas la lecionojn. En tio helpas la metodika pollingva konsillibro, verkita de la aŭtoro kaj senpage havebla al interesitoj en la elektronika formo.



Valoras ankoraŭ aldoni, ke pozitivan opinion pri la lernolibro esprimis ankaŭ esperantologoj kaj filologoj, al kiuj ĝi estis prezentita, i.a. prof. Michel Duc Goninaz.

Dum longa tempo mankis financaj rimedoj por eldoni la lernolibron. Krome, mankis, kaj plue mankas, personoj, kiuj helpus doni al ĝi profesion komputikan prilaboron. Nur amo al Esperanto kaŭzis, ke du personoj: la aŭtoro kaj mi, ne kapitulacis, sed venkis ĉiujn barojn kaj pene serĉante helpon, fine sukcesis ĝin eldoni.

Mi tre dankas al prof. Renato Corsetti, kiu trovante parton de la bezonata sumo ĉe Institucio Hodler '68, kuraĝigis min agi kaj efektiviĝi mian grandan revon: doni al Esperantujo altkvalitan Esperanto-lernolibron. Mi ankaŭ tre dankas pro

monsubteno la Eŭropan Centron de Interkultura Edukado kaj la polan sektion de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Fine mi dankas mian edzon, Ryszard Komarnicki, kiu aldonis la plej grandan sumon da mono.

Poloj jam de longe bezonis profesinivelan, modernan, enhave allogan kaj efikan Esperanto-lernilon. Ĝia manko de multaj jaroj estas en Pollando tre dolorige sentata. Rezulte de ĝi la lingvokono de multaj, eĉ plujare aktivaj polaj esperantistoj, estas katastrofe malalta. Tion konfirmas multaj esperantistoj, kiuj legas polajn revuojn, oficialajn leterojn aŭ informojn. Laŭ

ili dum la lastaj jaroj draste malaltiĝis la lingva nivelo de la uzantoj de Esperanto en Pollando.

Ĉi tiun negativan situacion ni decidis ŝanĝi per publikigo de la lernolibro, verkita speciale por poloj, en kiu fremdaj al ili kaj malpli facilaj gramatikaĵoj kaj leksikeroj estas detale klarigitaj kaj intense praktikataj. Ĝuste tia lernolibro estas *Sukceso per Esperanto* de Edward Malewicz.

La ĝisnuna manko de lernolibro por mezprogresintoj rezultis ankaŭ negativan percepton de Esperanto, fare de seriozaj, pensantaj homoj. Iuj el ili, fininte kurson por komencantoj kaj ne havinte eblon konatiĝi kun malpli simpla, malpli facila kaj nuancita lingvaĵo, venis al la konkludo, ke Esperanto estas malriĉa, sensinonima kaj primitiva lingvo. Tian opinion havas ekzemple profesoroj-lingvistoj el la Jagelona Universitato en Krakowo – cetere tre favoraj al Esperanto – kiuj en sia juneco lernis la lingvon, sed nur sur la baza nivelo. Ili rifuzis science ekokupiĝi pri Esperanto, kaŭze de ĝia “troa simpleco”.

Por ke la lernolibro de Edward Malewicz komplete plenumu la bezonojn de la nuntempa lernanto, oni ankoraŭ devas surdiskigi ĝiajn tekstojn disvolvantaj la kapablon aŭskulti. Sen la sondisko, la lernolibro estos nekompleta kaj kripla. Estus ankaŭ dezirinde prilabori kaj eldoni diskon kun komputilaj interaktivaj ekzercoj, kies tasko estas ripetigi kaj plifirmigi la enkondukitajn gramatikaĵojn kaj vortojn.

Plenuminte tiujn kondiĉojn, poloj havos lernolibron, kiu fariĝos modelo por tiaspecaj Esperanto-eldonaĵoj en aliaj landoj. Ĝi ankaŭ estos nia fieraĵo, ĉar en la historio de Esperanto ankoraŭ ne aperis tiel profesie prilaborita lernilo.

Per eldono de *Sukceso per Esperanto* ni estas ŝanĝantaj la bildon de Esperanto, kiu ofte estas perceptata kiel kruda, malmoderna kreaĵo, ĉar esperantistoj plej ofte uzas por instrui malnovmodajn lernilojn kaj utiligas arkaikajn metodojn, kvazaŭ ili timus nuntempecon kaj modernecon.

Ni invitas ĉiujn al kunlaboro por kompletigi la lernolibron per la menciitaj bezonataĵoj. Pri tio skribu al la retadreso: [informado.eo@gmail.com](mailto:informado.eo@gmail.com).

Finante, mi aldonu, ke Edward Malewicz, la aŭtoro de la lernolibro, estas magistro pri aplikata lingvistiko, diplomito de la Supera Lernejo pri Fremdaj Lingvoj de la Varsovia Universitato kaj de la Instituto pri Aplikata Lingvistiko de la Varsovia Universitato. En la lernolibro li utiligis siajn vastajn metodikajn sciojn kaj multjarajn spertojn en la instruado de la angla kaj Esperanto. *Sukceso per Esperanto* estas lia kvara E-lernolibro.

## Forpasis

Sabate, la 5-an de majo 2018, forpasis **Antoni Beyga**, multjara pedagogo, esperantisto kaj senlaca populariganto de Esperanto. Entombigo okazis la 9-an de majo 2018, je la horo 12:00, en la tombejo ĉe la str. Wolsztyńska en Siedlec. Kun bedaŭro Adam Wilkus.

Kun granda malĝojo, ni informas pri la forpaso de nia kara, multjara samideano **Roman Siemiątkowski**. La funebra ceremonio okazis la 13-an de aŭgusto 2018, je la horo 13:00, en la preĝejo al st. Maria Magdalena, ĉe la strato Wólczyńska 64 en Varsovio. Kun bedaŭro, en la nomo de PEA, Alina Mozer

Mi informas pri la forpaso de la multjara samideanino **Zuzanna Jankowska**. La funebra ceremonio okazis lunde, la 20-an de aŭgusto 2018, je la 12:00 h, en la romkatolika preĝejo, ĉe la str. Wolska 180/182 en Varsovio. kun bedaŭro, en la nomo de PEA, Alina Mozer

## Nia fotogalerio



PEJ-anoj dum Slot Art Festival 2018



La 12-an de julio bjalistikaj esperantistoj metis florojn sub memortabulo al Jakobo Sapiro

Bialistikanoj dum 103-a Universala Kongreso en Madrido



Jack Halpern la ĉefo de CJK Dictionary Institute en Japanio vizitis Esperanto-libraron en Bjalistoko

# NIA FOTOGALERIO 51-a ILEI-kongreso en Madrido

